



Kubo kaj Usono sin preparas por nova dialogo ĉi-semajne.



Cele al restarigo de la diplomaciaj rilatoj, reprezentantoj de la registaroj de Kubo kaj Usono renkontiĝos en Washington la 21-an de majo en la tria laborsesio inter la du landoj.

Gustavo Machín, ĝenerala vicdirektoro de la direkcio pri Usono de la kuba ministerio pri eksteraj rilatoj, precizigis dum dialogo kun la gazetaro, ke la “justa decido de la prezidento Barack Obama forigi Kubon de la listo de landoj subtenantaj terorismen internacian- kiu devas efektiviĝi la 29-an de majo-, kreas reciprokan kuntekston kaj regionan, taŭgan por avanci al la restarigo de la diplomaciaj rilatoj kaj la malfermo de ambasadejoj”, raportis la informagentejo AIN

Same, la progresoj en la agadoj por renovigi la bankajn servojn de la sekcio de interesoj de Kubo en tiu lando, kontribuas al tiu progreso en la dialogoj.

En tiu ĉi nova laborsesio ambaŭ landoj intereŝanĝos pri aspektoj rilataj al la funkciado de la diplomaciaj misioj kaj la konduto de ties funkciuloj, temoj antaŭe traktitaj, sed Kubo insistos pri la “observado de la principoj kaj la internacia juro establitaj en la Ĉarto de UN kaj la normoj starigitaj de la Konvencioj de Vieno pri la diplomaciaj kaj konsulejaj rilatoj”.

“La prezidento Raúl Castro tre rekte esprimis al la prezidento Obama la sintenon pri la limigo de translokiĝoj de la usonaj diplomatoj en Kubo, ĉar lin zorgigas ke la usonaj funkciuloj daŭre faru eksterleĝajn agadojn kiel ĝis nun ili faris, kio ne estas permesebla”, li emfazis.

Machín esprimis ke “neniu el la funkcioj establitaj en la Konvencio de Vieno tekstas ke la



ambasadejoj estas pedagogiaj centroj, kaj tio estas parto de la konduto de kiu ajn misio kaj ni preparolos tion”.

Machín taksis la dialogojn inter la du landoj kiel tre profesiaj kaj respektemaj, evoluintaj en konstrua etoso kaj en egalrajtaj kondicioj sur bazoj reciprokaj.

Denove, la ĝenerala direktorino pri Usono de la ministerio pri eksteraj rilatoj gvidos la kuban delegitaron kiu partoprenos la dialogon, kaj flanke de Usono prezidos la dialogon Roberta Jacobson, vicsekretario de ŝtato por hemisferaj aferoj.